



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

N-ro 28/1973 14 nov 1973

Aperas ĉiusemajne

Jus aperis n-ro 6/1973 de  
GERMANA ESPERANTO-REVUO (GER)

Legu kaj  
abonu GER

Unuopa GM  
numero 1,50  
\*\*\*\*\*

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (0911) 46 36 49; 5142 69

### Evento por francilingvaj landoj

#### L' ESPERANTO SANS PEINE

Paris (UFE) Organizita de Unuiĝo Franca por Esperanto konsente kun ASSIMIL okazos merkrede, la 12 dec 1973, de la 18 - 20 horo, sur la teraso Martini, 52 Champs Elysées, gazetara koktelo.

Tiam estos prezentita al la ĵurnalistoj la nova libro de la fama metodo ASSIMIL "L' esperanto sans peine", verkita de J. Thierry, lingve kontrolita de prof. G. Waringhien. Ĉi tiu moderna lernolibro, kiu baziĝas sur legado de mallongaj vivaj tekstoj (plej ofte konsistantaj el dialogo aŭ letero) kaj kiu celas instrui la parolatan lingvon per ripeta asimilado de la elementoj en ĉiutagaj frazoj, estas destinita precipe por memlernantoj, al kiu mankas la tempo necesa por ĉeesti kurson, sed restas disponeblaj kelkaj minutoj ĉiutage por legi sola unu aŭ du paĝojn.

La libron povas akompani serio da diskoj, kasetoj aŭ sonbendoj kun la voĉoj de s-inoj F. Ballaven kaj J. Ravšelj, f-ino S. Bennet, kaj de s-roj R. Bernard, C. Minnaja kaj J. Wells, akademianoj, kaj de s-roj M. Audibert kaj H. Gonin.

La tuta kurso konsistas el tri fazoj: la unua de ses semajnoj estas nure pasiva (nur laŭtlegi kaj kompreni); la dua de ok semajnoj estas miksa, pasiva kaj aktiva (necesas krome reesprimi en Esperanton la tradukitan parton); la lasta de ses semajnoj nure aktiva. Sed ĉi tiu oportuna disdivido prezentas elastecon tiel, ke ĉiu lernanto povas adapti ĝin je sia propra ritmo; eĉ kursgvidantoj povos laborigi siajn lernantojn surbaze de la libro, havigante al ili kontrolon kaj pliajn klarigojn.

En tri jaroj ĉi tiu libro estos la kvara en Francujo publikigita de de neesperantistaj eldonejoj, nome: "Laŭtema vortaro" de M. Duc-Goninaz (Ophrys), "Je parle espéranto" de J. Thierry (Marabout-Flash), "L'Espéranto" de P. Janton ("Que sais-je?" P.U.F.).

Assimil, Paris, havas agentejojn en Bruxelles, Amsterdam, Düsseldorf, Lausanne, London, Madrid, Montreal, New York, Torino.

\*\*\*\*\*

### ROMOLO-kunveno

Mainz (pp) Sen grandaj eventoj pasis la jarkunveno de ROMOLO, la Esperanto-ligo por la esperantistoj de Rejno kaj Majno, partoprenis ĉ. 40 personoj, inter ili la junaj agantoj el Offenbach kaj Darmstadt. Montriĝis denove el la raportoj, ke nur en tiuj lokoj, kie lasttempe eklaboris junaj fortoj, okazas vigla informado kaj E-kursoj, kiel ekz. en Offenbach kaj Darmstadt. Pli vigla kaj pli ampleksa fariĝis la diskuto, kiam oni paroliĝis pri la novaj GEA-kotizoj. La nova kotizsistemo laŭ enspezoj speciale kaŭzos problemojn al la lokaj grupoj. Bernhard Zenker estis reelektita prezidanto de ROMOLO, kiun oficon li nun jam tenas 20 jarojn. Sekretario fariĝis Robert Kvasnak, la juna E-aganto el Offenbach. La partoprenantoj povis rigardi kaj aĉeti E-librojn.



(as) In der Zeit bis 16. 11. können die Besucher und Kunden der Kreissparkasse Blieskastel am Paradeplatz eine Ausstellung besichtigen. Unter dem Titel: „Esperanto - Sprache der internationalen Verständigung“, werden umfangreiche Schriften in Esperanto gezeigt. Wie weit diese Sprache bereits international vorgedrungen ist, beweist das bekannte Buch „Der Siruwelpeter“, das in Aufmachung und Bildern unserem Buch für die Kleinen gleichkommt. Aber auch Briefköpfe, versehen auch mit Esperanto - Postwertzeichen, sind hier wahrzunehmen. Kurse zur Erlernung dieser Weltsprache gibt es u. a. bei der Volkshochschule Homburg, auch an der Uni in Saarbrücken beginnt bei Semesteranfang ein neuer Kurs. (Foto: Allgayer)

Ĝis la 16 nov 1973 estas rigardebla en la ejoj de la distrikta ŝparkaso Blieskastel Esperanto-ekspozicio sub la titolo  
"Esperanto - Lingvo de la internacia komprenigo" Pfälzischer Merkur  
Blieskastel, 29.10.73

Homoj kaj Nomoj

kun kaj sen renomoj

Unuiĝo Franca por Esperanto festos sian 75an datrevenon de fondiĝo la 5 dec 1973 okaze de la oficiala inaŭguro de la nova sidejo de UFE akirita dank' al la malavareco de sia membraro.

F-ino Muriel Bénazet, Perpignan, translokiĝis por 9 monatoj al Londono. Okaze de la adresbango ŝi skribis: "Mi samtempe profitas la okazon por esprimi al vi mian ĝojojn kaj dankemon ricevi tiom utilan kaj vivantan komunikilon kiu estas Pilo..."

Tanja Olivia Walz naskiĝis la 22 okt 1973 je la 22a horo en Zweibrücken. Tanja Olivia estas la filineto de la japan-germana geedza paro Takajo kaj Oliver Walz.

Stanisław Swistak, la prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, edziĝos - Kiel ni eksciis el bone informitaj fontoj - la 17 nov 1973 en Krakovo. La nomo de la estonta prezidanta edzino estas Danuta. - El la samaj fontoj ni eksciis, ke similan paŝon planas fari la konata varsovia kursgvidanto, Zygmunt Nagaj, kiu edziĝos en decembro 1973 instruistininon Agnesa, kiu estonte planas ankaŭ instrui Esperanton.

R. Huguet, departementa konsilanto kaj urbestro, starigis en la revuo "Journal Officiel" de la 10.10.1973 demandon al la ministro de nacia edukado pri la instruado de Esperanto. Abonantoj de "Journal Officiel", oficiala ŝtata gazeto de la franca respubliko, estas ŝtataj, departementaj kaj urbaj instancoj de Francujo.

Lucien Giloteaux, Crois, informas, ke en "Bulletin", la franclingva informilo de la gazetara kaj informa oficejo en Bonn, anoncis en sia n-ro 35/73 la Universalan Esperanto-Kongreson en Hamburg, kaj la la kongresojn de Münster kaj Oberkirch.

### Germana Esperanto-Revuo

Nürnberg (pp) Dum ĉi tiuj tagoj aperis la 6a numero 1973 de Germana Esperanto-Revuo. La numero enhavas artikolojn pri movadaj aferoj kaj bultenon pri la 59a UK en Hamburg, raporton pri la aŭdienco ĉe prezidento Heinemann, pri kultura agado per Esperanto kun fotoj. La artikolo de F.W. Poppeck "Kiel sindikato en Sovetunio" redonas impresojn de studvojaĝanto. La junulara bulteno "pozitive" donas detalajn informojn pri la ĉi-jara Internacia Seminario de GEJ kaj pri 30a Internacia Junulara Konferenco 1974 en Münster.

Germana Esperanto-Revuo aperas okfoje jare kaj kostas 12,- GM por enlandaj kaj 13,- GM por eksterlandaj abonantoj. Membroj de GEA ricevas la revuon senpage. Abonu ĉe Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113, PSchK Nürnberg 819 56-851.

\*\*\*\*\*

### Kultura Semajnfino en Lugano

Lugano (urgra) 80 esperantoj kun diversaj lingvoniveletoj partoprenis la kultureman semajnfinojn en Lugano de la 3 - 4 nov 1973. Prelegis al tri studgrupoj Ing. Azzi, Claude Gacond, d-ro Renato Corsetti, d-ro Carlevaro. Okazis diversaj intervjuoj en la itala programo de Svisa Radio pri Esperanto. Dimanĉe, la 4 nov 73, de la 15 - 15,20 h, la Svisa Televido elsendis koloran intervjuon kun doktoro Tazio Carlevaro kaj Ursula Grattapaglia pri la neceso de Esperanto, en la nuntempaj internaciaj rilatoj, kaj pri la stato de Esperanto en Kantono Ticino. La intervjuo okazis kadre de la multe rigardata programo "Amichevolmente" (Amike).

### 50 mil kilometroj kun "Proksima Nekonato"



Varsovio (PEA) La populara varsovia vespera ĵurnalo "Kurier Polski" en sia numero de 7a novembro aperigis ampleksan intervjuon kun la polaj aktoroj Kalina Piehiewicz kaj Zbigniew Dobrzynski, revenintaj post la eksterlanda turneo al Pollando. La titolo de la intervjuo estas: Post granda turneo de aktoroj-esperantistoj - 50 mil kilometroj kun "Proksima Nekonato" La intervjuo estas tre favora kaj montras la grandan valoron de Esperanto por la teatro-arto. La 30 okt en la populara radioprogramo "En Varsovio kaj en Mazovio" oni aŭdigis radio-intervjuon kun ge-sroj Pienkiewicz kaj Dobrzynski, en kiu oni ankaŭ tre favore parolis pri la internacia lingvo ĝenerale kaj tutspeciala pri la apliko de la lingvo por teatraj prezentadoj.

Similaj intervjuoj kaj informoj pri la turneo de la geaktoroj aperos baldaŭ en pluraj regionaj ĵurnaloj kaj revuoj.

\*\*\*\*\*

### Esperanto en la radio (pp)

Bedaŭrinde ĉi-semajne mi ne povis sekvi ĉiujn E-elsendojn. Pekinon mi mi provis kapti, sed ne sukcesis, jam la duan semajnon. Same mi ne sukcesis en Nürnberg kapti la novan elsendojn de Radio Wien. Eble la stacio estas tro malforta? Tamen Lucien Giloteaux aŭdis la Vienajn elsendojn, sabate je la 10.11.73, inter la 16,45 kaj 16,55 h en Francio. Do la stacio elsendas! La Varsovia E-Ekspresso disaŭdigis tri interesajn intervjuojn, i.a. tiun kun ambasadoro Ralph Harry, kiu esperas, ke baldaŭ fondiĝos asocio de Esperanto-parolantaj ambasadoroj. Varsovio salutis la ROMOLO-kunvenon de la 11 nov 1973 en Mainz kaj raportis pri la kunvenoj en Nürnberg kaj Kirekel.

P O L S K I E R A D I O  
W a r s z a w a

10-tagaj ekskursoj tra Pollando

Multaj premioj kaj objektaj donacoj

En konkurso de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj aŭskultantoj okaze de la Jartrideko de Popola Pollando.

Al partopreno en la lotado de la premioj rajtigas respondo almenaŭ al unu el la subaj demandoj:

- 1) Kiujn atingaĵojn de Pollando / sociajn, ekonomiajn, kulturajn ktp./ en la periodo de la 30 lastaj jaroj vi opinias la plej interesaj?
- 2) Pri kio karakteriza: nomo, evento, fenomeno, objekto ktp. - vi ekpensas lige kun Pollando?
- 3) Kiujn establenejojn projektitajn aŭ konstruitajn de poloj en via lando aŭ en la mondo vi konas?

La respondojn ni petas sendi laŭ adreso: Polskie Radio, 00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso" ĝis la 31 de decembro 1973 j. / decidus la dato de la poŝta stampo/.

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en la disaŭdigoj emisiotaj la 31-an de januaro 1974 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Partoprenu mem kaj partoprenigu aliajn.

Ni deziras al vi bonŝancon!

Polskie Radio